



LA FINANCA DO

La bavaria ĉefurbo Munkeno transprenis la kostojn de rekonstruado kaj renovigo de la domo kaj faris kontrakton pri utiligo kun EineWeltHaus München e. V.

La kultura fako de la provinca ĉefurbo Munkeno pagas la kostojn de baza financado por la dungitoj kaj la materialo.

La subvenciojn necesajn por aldonaj akiroj, okazaĵoj kaj aldonaj kostoj devas alporti la asocio EineWeltHaus e. V. kaj la grupoj. Pro tio EWH dependas precipe de donacoj.

DONACOJ TRE BONVENAS!

Ĉu vi deziras subvencii EineWeltHaus per donaco unufoja aŭ regula? Do, bonvolu ĝiri sumon laŭ via elekto al nia konto:

Banko: Bank für Sozialwirtschaft

Konto: 8877400, banka kodo (BLZ) 70020500

Se vi deziras, ni donos al vi donac-kvitancon.

NI SERĈAS SUBTENAJN MEMBROJN!

Ĉu vi deziras iĝi subtena membro de la asocio Trägerkreis EineWeltHaus München e. V. kaj subteni ĝiajn aktivadojn per regula kotizo? La minimuma sumo estas 50 eŭroj jare.

Bonvolu turniĝi al nia oficejo.

Trägerkreis EineWeltHaus München e. V.

Schwanthalerstr. 80, 80336 München

(U4/U5 Theresienwiese)

Tel. +49 89 85 63 75 – 0

Faks +49 89 85 63 75 – 12

www.eineweltHaus.de

geschaefsstelle@eineweltHaus.de

Horaro de la oficejo:

Lunde, merkredo, vendredo 8h30 – 12h00

Marde, ĵaŭde 8h30 – 16h00

Horaro de la financa oficejo

Marde, ĵaŭde 12h30 – 16h00



Homoj
el ĉiuj kulturoj
kune realigas
la

EineWeltHaus



LA IDEO

En julio 2001 la EineWeltHaus establiĝis kiel projekto de la „Loka Agendo 21 Munkeno“. Tio signifas, ke kreiĝis loko, kie personoj de ĉiuj kulturoj povas renkontiĝi en kompletaj solidareco kaj pacismo.

Sincereco, toleremo, diverseco, interkonsento karakterizas la EineWeltHaus (germane: UnuMonda Domo, pr. ajne velt haŭs) kiel lokon de dialogo kaj solidareco por homoj de ĉiuj etnecoj.

Ĝi estas vivoplena domo, kie oni diskutas la temojn de interkultureco, de migrado kaj de politika evoluo. Okazas ankaŭ kulturaj eventoj kiaj prelegoj, ekspozicioj, koncertoj kaj filmaj prezentadoj.

REGULAJ OFERTOJ

Jen uzulaj grupoj, kiuj apartenas al la fondaj grupoj de EineWeltHaus kaj tie havas proprajn oficejojn kun reprezentantoj kaj proponas konsiladon.

- La responsa acocio **EineWeltHaus Munkeno** kun siaj dungitoj kaj volontuloj, kiuj organizas kaj administras la asocion kaj ofertas kelkajn eventojn.
– www.einewelthaus.de
- La **Centro Tria Mondo** (Dritte-Welt-Zentrum e. V.) ofertas konsiladon por enmigrintoj, individuaj aŭ grupaj, helpas per tradukado kaj organizas ankaŭ eventojn.
– www.drittweltzentrum.de
- La **Interkultura Forumo** (Interkulturelles Forum) prezentas konsiladon kaj projektojn por enmigrintoj kaj aktivis pri publikaj rilatoj. – www.ikforum.de
- La **Jura Helpo por Eksterlandanoj Munkeno** (Rechtshilfe für AusländerInnen München e. V.) konsilas kaj helpas pri demandoj de politika azilo kaj restadrajto.
– www.rechtshilfe-muenchen.de
- La **Munkena Forumo Nord-Suda** (Nord-Süd-Forum München e. V.) kunordigas aktivadojn pri la temo nordosudo en Munkeno, interligas diversajn grupojn, laboras pri premgrupoj kaj publikaj rilatoj kaj estas ankaŭ kunordigejo por interesuloj kaj disponigas pedagogian materialon.
– www.nordsuedforum.de
- De 2006 la **Interkultura Enmigra Servo de la Iniciata Grupo** subtenas la integradon de enmigrintoj per projekto de patronado, lingva kuraĝigo kaj informaj aktivadoj. En okazo de interkulturaj konfliktoj ĝi ofertas mediacion.
– www.initiativgruppe.de

VOLONTULAJ PROJEKTOJ

Internacia biblioteko

La biblioteko ofertas librojn, filmdiskojn kaj muzikdiskojn en pluraj lingvoj. La membreco de la biblioteko estas senkosta. La biblioteko troviĝas je la unua etaĝo en ĉambro 122.

Horaro: Lundo 10h00 – 15h00, mardo 14h30 – 19h30, merkredo 10h00 – 15h00, ĵaŭdo 14h30 – 19h30, vendredo 9h00 – 14h00.

Donacoj en la formo de muziko, literaturo aŭ filmoj pri la devizo de la asocio estas same bonvenaj kiel volontulaj kunlaborantoj. Tel. 85637524

EineWeltRadio

La radiostacio EineWeltRadio dissendas ĉiulunde sur la ondo de Radio Lora (92,4 MHz), de la 17-a al la 18-a horoj kun novaĵoj, informoj pri eventoj kaj partoj de registraĵoj de spektakloj. Radio-amatoroj estas bonvenaj partopreni volontule. Por registri viajn eventojn bonvolu kontakti s-ron Eckhard Thiel per 4481018.

Libro-angulo

En la libro-angulo (Bücher-Corner) eblas senkoste pruntepreni librojn kaj donaci proprajn. La libro-angulo situas en la unua etaĝo, en ĉambro 107.

LUO DE SALONOJ

Por viaj seminarioj, kunven- aŭ laborgrupoj aŭ publikaj aranĝoj vi povas lui malmultekostajn ĉambrojn en la EWH. disponeblas 11 ejoj, ekde malgranda kunvenejo (24 m²) ĝis granda salono (122 m²).

Bonvolu kontakti nian rezervadan servon:

Tel. 089 – 8563750



LA UZANTOJ

Konstantaj uzantoj

La konstantaj uzulgrupoj rezervas salonojn regule por siaj kunvenoj aŭ aranĝoj.

Ili plenumas certajn kriteriojn por registriĝi kiel konstanta grupo kaj pagas reduktitan luprezon.

Asociitaj grupoj

Esta dezirinde, ke grupoj de uzantoj de la domo estu membroj de la subtena asocio EineWeltHaus München e. V. Kiel membra grupo ili havas multe pli da partoprenrajtoj kaj kunlaboras pri la politikaj decidoj de la asocio.

EWH nun havas proksimume 40 membrojn, kiuj laboras pri la temoj evoluo, paco, migrado, homaj rajtoj, ekologio kaj kulturo.

Okazaj uzantoj

La aliaj uzantoj, kiuj luas salonojn en la EWH, nomiĝas okazaj aŭ provizoraj uzantoj. Post unu jaro kaj laŭ difinitaj kondiĉoj ili povas peti definitivan asociiĝon. Pri la kondiĉoj informas la oficejo, tel. 089 – 8563750.

RESTORACIO „WELTWIRTSCHAFT“

La restoracio en la teretaĝo invitas al restado, diskutado, manĝado kaj trinkado; okaze de aranĝoj ĝi provizas la partoprenantojn je favora prezo.

(Klarigo: La germana esprimo „Wirtschaft“ signifas kaj „restoracio“ kaj „ekonomio“; la nomo de la ejo do povas signifi „monda restoracio“ aŭ „monda ekonomio“.)

La tekston tradukis Reinhard Fössmeier, Esperanto-Klub München e. V.
www.esperanto-muenchen.de

2012-04



EineWeltHaus

München e. V.